Ni multaj estas unu korpo en KRISTO

Downes:

# LA HEIDELBERGA KATEKISMO

Oekumenische Liga e. V.

# LA HEIDELBERGA KATEKISMO

Tradukita de
profesoro pastoro W. J. Downes, M. A., B. D.
membro de la Akademio de Esperanto
Plymtree, Cullompton

Dediĉita al la
fratinoj Charlotte kaj Anni Ostertag

Eldonita de
Oekumenische Liga e. V., Delmenhorst

Presita de
St.-Johannis-Druckerei C. Schweickhardt, Lahr-Dinglingen (Baden)
10004/1967

## *Antaŭparolo*

De la princ-elektoro Frederiko III de la Palatinato komisiite, la teologoj Ursinus kaj Olevianus verkis tiun ĉi katekismon en germana lingvo. En la jaro 1563 la palatinata sinodo en Heidelberg akceptis ĝin. La Heidelberga Katekismo fariĝis iom post iom la instru- kaj konfeslibro por la reformitoj en tuta Germanujo, en Svislando, Nederlando, Polujo, Hungarujo, Bohemujo, Transilvanio kaj Nordameriko. Oni tradukis ĝin en ĉk. 40 lingvojn. La unuan tradukon en Esperanton laŭ malnova germana teksto faris Roel van Spronsen en Den Haag en la jaroj antaŭ kaj post la dua mondmilito kaj publikigis la unuan parton en „Kristana Gazeto" kaj la reston en „Dia Regno". Post kiam la jarkunveno de la Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) 1957 en Münchenwiler estis decidinta eldoni la luteran kaj la heidelbergan katekismojn, van Spronsen korektis sian tekston kaj interkontaktis kun pastoro Brinkmann en Lengerich. Poste van Spronsen sendis la manuskripton al profesoro Downes en Bristol kun la peto kontroli ĝin. 1961 la germana sekcio de KELI, la Oekumenische Liga e. V., eldonis „La Malgranda Katekismo de Doktoro Martin Luther", tradukitan de pastoro Richard Hoppe en Auerbach. Sed KELI pro manko de sufiĉaj financaj rimedoj ne povis eldoni la Heidelbergan Katekismon. 1966 f-ino Anni Ostertag donacis mil markojn el la heredaĵo de sia fratino + Charlotte Ostertag al la germana sekcio. Ĝia estraro decidis eldoni ankaŭ tiun ĉi katekismon. Downes alprenis krome la modernan tekston de la Zwingli-Verlag en Zürich el la jaro 1943 kaj faris novan tradukon, komparante ĝin kun la traduko de van Spronsen. Ĉi tiu traduko do estas la finrezulto de longa laboro, en kiu diversaj homoj parto-

prenis. Dio ĝin benu kaj faru ĝin fonto de beno al ĉiuj, kiuj ĝin uzos.

Por pli bone uzi la du plej gravajn katekismojn de la reformacio unu apud la alia, ni aldonas indekson laŭ la pli aĝa katekismo:

| | Paĝoj en la Lutera | Demandoj en la Heidelberga |
|---|---|---|
| Dek Ordonoj | 9—13 | 92—115 |
| Kredo | 14—16 | 23—64 |
| Patronia | 17—20 | 116—129 |
| Sankta Bapto | 21—22 | 69—74 |
| Sankta Vespermanĝo | 23—24 | 75—81 |
| Ofico de la Ŝlosiloj | 25—27 | 82—85 |

D-287 Delmenhorst, en Marto 1967
Schützenhofstr. 4

Oekumenische Liga e.V.
Quentin



# LA HEIDELBERGA KATEKISMO

## Demando 1

*Kio estas via sola konsolo en la vivo kaj ĉe la morto?*

Ke laŭkorpe kaj laŭanime, vivante kaj mortante, mi ne apartenas al mi mem, sed al mia fidela Savanto Jesuo Kristo, kiu per Sia kara altvalora sango plene pagis por ĉiuj miaj pekoj, kaj elaĉetis min tute el la potenco de la diablo. Li tiel protektas min, ke, krom se mia Patro en la ĉielo tion volas, neniu haro povas fali de mia kapo — ja ankaŭ, ke ĉio devas kunlabori al mia savo. Tial ankaŭ per Sia Sankta Spirito Li sekurigas al mi la eternan vivon, kaj faras min ĉiam tutkore volanta kaj preta vivadi por Li.

## Demando 2

*Kiom da aferoj vi devas konstati, por ke vi povu feliĉe vivi kaj morti en tiu konsolo?*

Tri aferojn: unue, kiel grandaj estas miaj pekoj kaj mizero; due, kiamaniere mi povas esti liberigita el ĉiuj miaj pekoj kaj el mia tuta mizero; kaj trie, kiamaniere mi devas esti danka al Dio pro tiu liberigo.

## LA UNUA PARTO

### *Pri la Mizero de la Homo*

Demando 3

*Per kio vi ekkonas vian mizeron?*

Per la Leĝo de Dio.

Demando 4

*Kion postulas de ni la Leĝo de Dio?*

La enhavon de la Leĝo Kristo resumas en la Diordono: „Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso. Ĉi tiu estas la granda kaj la unua ordono. Kaj dua estas simila al ĝi: Amu vian proksimulon kiel vin mem. De ĉi tiuj du ordonoj dependas la tuta Leĝo kaj la profetoj" (Mateo 22 : 37—40).

Demando 5

*Ĉu vi povas perfekte observi ĉion tion?*

Ne, ĉar laŭnature mi inklinas malami Dion kaj mian proksimulon.

Demando 6

*Ĉu Dio kreis la homon tiel malbona kaj perversa?*

Ne, Dio kreis la homon bona, justa kaj sankta laŭ Sia propra bildo, por ke li prave konu Dion, sian Kreinton, elkore Lin amu, kaj en eterna feliĉego vivu kun Li por Lia laŭdo kaj gloro.



Demando 7

*Kio estas tiel koruptinta la naturon de la homo?*

La falo kaj malobeemo de niaj unuaj gepatroj Adam kaj Eva en la Paradizo tiel venenis nian naturon, ke ni ĉiuj estas koncipitaj kaj naskiĝintaj en pekoj.

Demando 8

*Ĉu ni estas koruptitaj ĝis tia grado, ke ni estas tute nekapablaj por la bono kaj inklinitaj al ĉia malbono?*

Jes, krom se ni estas denove naskiĝintaj per la Spirito de Dio.

Demando 9

*Ĉu Dio ne agas maljuste kontraŭ la homo, postulante de li en Sia Leĝo tion, kion li ne povas observi?*

Ne, Dio kreis la homon tia, ke li ja povis observi ĝin; sed la homo per petola malobeemo forrabis de si kaj de ĉiuj siaj posteuloj la donacojn, kiujn Dio konfidis al li. Al tio la diablo lin instigis.

Demando 10

*Ĉu Dio volas lasi nepunita tian malobeemon kaj ribelon?*

Ne, Li terure koleriĝas pri ennaskitaj kaj faritaj pekoj kaj volas laŭ Sia justa juĝo puni ilin tempe kaj eterne laŭ Sia deklaro: „Malbenita estu ĉiu, kiu ne persistos en ĉio, kio estas skribita en la libro de la Leĝo, por plenumi ĝin" (Readmono 27 : 26. Gal. 3 : 10).

## Demando 11

*Ĉu Dio ne estas kompatema?*

Dio ja estas kompatema, tamen ankaŭ justa. Tial Lia justeco postulas, ke la peko, kiun oni faris kontraŭ la plej alta majesteco de Dio, estu ankaŭ punita per eterna puno de korpo kaj animo.



# LA DUA PARTO

## *Pri la Elaĉeto de la Homo*

## Demando 12

*Laŭ la justa juĝo de Dio ni estas meritintaj tempan kaj eternan punon. Kiel ni povas eviti tiun punon kaj reakiri la gracon de Dio?*

Dio ne cedas pri Sia justa postulo, tial ni devas por nia kulpeco aŭ ni mem aŭ pere de iu alia fari plenan pagon.

## Demando 13

*Ĉu ni mem povas pagi?*

Ne, ĉiutage ni faras la kulpon pli granda.

## Demando 14

*Ĉu ia kreitaĵo povas anstataŭi nin antaŭ la tribunalo de Dio?*

Ne. Dio volas ne puni alian kreitaĵon por tio, pri kio la homo mem estas kulpa; kaj nenia kreitaĵo povas porti la ŝarĝon de la eterna kolero de Dio kontraŭ la peko kaj per tio elaĉeti alian homon.

## Demando 15

*Kian interulon kaj elaĉetanton ni devas serĉi?*

Unu, kiu estas vere justa homo kaj tamen pli forta ol ĉiuj kreitaĵoj, tio estas, kiu samtempe estas vere Dio.

Demando 16

*Kial li devas esti vere justa homo?*

Ĉar li nur en la potenco de sia Dia naturo povas porti enpekiĝis, donu kompenson por la peko; tamen, iu, kiu mem estas pekulo, ne povas doni kompenson por aliaj homoj.

Demando 17

*Kial li devas samtempe esti vere Dio?*

Ĉar la justeco de Dio postulas, ke la homa naturo, kiu la ŝarĝon de la koler-juĝo de Dio sur sia homa naturo kaj akiri por ni kaj revenigi al ni la justecon kaj la vivon.

Demando 18

*Kiu estas la interulo, kiu estas samtempe vere Dio kaj vere justa homo?*

Nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu estas al ni donacita, por ke ni per Li akiru perfektan elaĉeton kaj justecon.

Demando 19

*De kie vi scias tion?*

El la Sankta Evangelio, kiun Dio mem unue revelaciis en la paradizo, poste predikigis pere de la sanktaj patriarkoj kaj profetoj. Li antaŭfiguris ĝin per la oferoj kaj aliaj ceremonioj de la Leĝo kaj fine plenumis ĝin pere de Sia amata Filo.

Demando 20

*Ĉu ĉiuj homoj denove saviĝos pere de Kristo, kiel ili pereis pere de Adam?*



Ne; nur tiu, kiu estas ligita kun Li per vera kredo, ricevas ĉiujn Liajn bonfarojn.

Demando 21

*Kio estas vera kredo?*

Vera kredo estas ne nur firma scio, per kiu mi tenas vera ĉion, kion Dio estas revelaciinta al ni en Sia Vorto, sed ankaŭ elkoran fidon, kiun la Sankta Spirito per la Evangelio efektivigas en mi, tiel ke ne nur al aliaj homoj, sed ankaŭ al mi, Dio donacas pardonon de pekoj, eternan justecon kaj savon — ĉion tion pro pura graco, kaj sole pro la merito de Kristo.

Demando 22

*Kion Kristano devas kredi?*

Ĉion, kio estas promesita al ni en la Evangelio, kies ĉefenhavo estas resumita en la apostola Kred-konfeso kaj unuanime konfesata de la tuta Kristanaro.

Demando 23

*Kiel tekstas la apostola Kred-konfeso?*

Mi kredas je Dio la Patro, la Ĉiopova, Kreinto de la ĉielo kaj de la tero,
kaj je Jesuo Kristo, la sola Filo de Dio kaj nia Sinjoro, kiu enkarniĝis per la Sankta Spirito, naskiĝis el la virgulino Maria, suferis sub Pontio Pilato, estis krucumita, mortinta kaj entrombigita, malsupreniris en la inferon, la trian tagon estis relevita el la mortintoj, supreniris en la ĉielon, sidas dekstre de Dio, la Patro ĉiopova, de kie Li revenos, por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.
Mi kredas je la Sankta Spirito, unu sankta universala

Eklezio, la interkunuleco de la sanktuloj, pardono de la pekoj, relevo de la karno, kaj la vivo eterna.

Demando 24

*Kiel estas tiuj artikoloj aranĝitaj?*

En tri partojn. La unua temas pri Dio la Patro kaj Lia kreo de ni; la dua pri Dio la Filo kaj Lia elaĉeto de ni; la tria pri Dio la Sankta Spirito kaj Lia sanktigo de ni.

Demando 25

*Ni kredas je la unusola Dio. Kial do vi parolas pri Patro, Filo kaj Sankta Spirito?*

Ĉar Dio en Sia Vorto estas revelaciinta Sin kiel triobla; tri diversaj Personoj estas la unusola, vera, eterna Dio.

## *Pri Dio la Patro*

Demando 26

*Kion vi kredas, kiam vi diras: Mi kredas je Dio la Patro, la Ĉiopova, Kreinto de la ĉielo kaj de la tero?*

Ke la eterna Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo, kiu kreis el nenio la ĉielon kaj la teron kune kun ĉio, kio estas en ili, kaj kiu per Sia eterna intenco kaj Sia providenco subtenas kaj regadas ilin, estas pro Sia Filo mia Dio kaj mia Patro. Mi fidas al Li kaj ne dubas pri tio, ke Li zorgos pri mi laŭkorpe kaj laŭanime, kaj ke Li kunlaborigos al mia plejbono eĉ ĉiun malbonon, kiun Li sendos al mi en ĉi tiu valo de malĝojoj. Tion Li kiel ĉiopotenca Dio povas fari, kaj tion Li kiel mia fidela Patro volas fari.



Demando 27

*Kion signifas al vi la Providenco de Dio?*

La ĉiopovan kaj ĉiam kunestan potencon de Dio, per kiu Li subtenas kaj regadas la ĉielon kaj la teron kune kun ĉiuj kreitaĵoj. Foliaro kaj herbo, pluvo kaj sekeco, fruktodonaj kaj malfruktodonaj jaroj, manĝaĵoj kaj trinkaĵoj, sano kaj malsano, riĉeco kaj malriĉeco estas ne aferoj de la hazardo, sed ili ĉiuj venas al ni el Lia patra mano.

Demando 28

*Kian utilon havas por ni la scio pri la kreanteco kaj providenco de Dio?*

Ĝi donas al ni paciencon en malfacilaj tagoj, dankemecon en prosperaj tagoj, kaj por la estonteco pere de nia fido al Dio nia fidela Patro certecon, ke nenia kreitaĵo apartigos nin de Lia amo, ĉar Li tenas ĉiujn kreitaĵojn en Sia mano tiel, ke ili ne povas movi sin aŭ agiti, se Li ne volas tion.

## *Pri Dio la Filo*

Demando 29

*Kial la Filo de Dio ricevis la nomon Jesuo, kiu signifas „Savanto"?*

Ĉar Li savas nin el niaj pekoj, kaj ĉar en neniu alia estas tiu savo atendebla aŭ trovebla.

## Demando 30

*Ĉu ankaŭ kredas je Jesuo la unusola Savanto tiuj, kiuj serĉas sian savon kaj animan bonfarton en la sanktuloj, en si mem aŭ ie alie?*

Ne; kvankam ili laŭdas Lin per vortoj kiel sian Savanton, tamen per faroj ili malkonfesas la unusolan Savanton Jesuon. Ĉar firme staras la alternativo: aŭ Jesuo ne estas perfekta Savanto; aŭ tiu, kiu akceptas Lin per vera kredo, devas havi en Li ĉion, kio estas necesa por lia savo.

## Demando 31

*Kial oni nomas Lin Kristo, tio estas Sanktoleito?*

Ĉar Li estis de Dio la Patro destinita kaj per la Sankta Spirito oleita,
ke Li estu nia plej supera profeto kaj instruanto, kiu plene revelaciis al ni la kaŝitan intencon kaj volon de Dio pri nia elaĉeto;
ke Li estu nia unusola ĉefpastro, kiu elaĉetis nin per la ofero de Sia korpo, kaj daŭre per Sia propetado reprezentas nin antaŭ la Patro;
kaj ke Li estu nia eterna reĝo, kiu regas nin per Sia vorto kaj Sia Spirito, kaj tenas kaj konservas nin en Sia elaĉeto.

## Demando 32

*Sed kial oni nomas vin Kristano?*

Ĉar pro mia kredo mi estas membro de Kristo kaj pro tio mi partoprenas en Lia sanktoleiĝo, por ke ankaŭ mi konfesu Lian nomon, dediĉu min al Li kiel vivantan dankoferon, kun libera konscienco batalu dum ĉi tiu



vivo kontraŭ la peko kaj la diablo kaj iam en la eterneco regu kun Li super ĉiuj kreitaĵoj. .

## Demando 33

*Kial oni nomas Lin la solenaskita Filo de Dio malgraŭ tio, ke ankaŭ ni estas infanoj de Dio?*

Car Dio eĉ antaŭ la eterneco naskis sole Kriston kiel Filon, sed pro Li per graco akceptis nin kiel infanojn.

## Demando 34

*Kial vi nomas Lin nia Sinjoro?*

Kristo, ne per oro aŭ arĝento, sed per Sia kara altvalora sango, elaĉetis nin korpe kaj anime el niaj pekoj, liberigis nin tute el la potenco de la diablo kaj aĉetis nin, ke ni estu Lia propraĵo.

## Demando 35

*Kion signifas: „kiu enkarniĝis per la Sankta Spirito, naskiĝis el la virgulino Maria"?*

La eterna Filo de Dio, kiu estas kaj restas vere eterna Dio, alprenis veran homan naturon el la karno kaj sango de la virgulino Maria per la agado de la Sankta Spirito, por ke Li estu vera ido de David kaj ĉiurilate simila al Siaj fratoj, kun escepto de la peko.

## Demando 36

*Kian utilon havas por vi la sankta enkarniĝo kaj naskiĝo de Kristo?*

Li estas nia Interulo, kaj per Sia senkulpeco kaj perfekta sankteco Li kovras antaŭ la vizaĝo de Dio mian pekecon, en kiu mi estis koncipita.

## Demando 37

*Kion vi komprenas per la vorto „suferis"?*

En Sia korpo kaj animo dum Sia tuta vivo sur la tero, precipe je ties fino, Li portis la koleron de Dio kontraŭ la peko de la tuta homaro, por ke Li per Sia suferado kiel la unusola repacig-ofero elaĉetu nian korpon kaj nian animon el la eterna kondamno kaj akiru por ni la gracon de Dio, justecon kaj la eternan vivon.

## Demando 38

*Kial Li suferis sub la juĝisto Pontio Pilato?*

Por ke Li, senkulpa, estu kondamnita de laŭmonda juĝisto kaj per tio elaĉetu nin el la severa juĝo de Dio.

## Demando 39

*Ĉu la morto sur la kruco pli gravas, ol iu ajn alia maniero morti?*

Jes; per tiu morto mi scias, ke la malbenon, kiu kuŝis sur mi, Li prenis sur Sin, ĉar Dio malbenas tiun, kiu mortas sur kruco (Readmono 21:22—23).

## Demando 40

*Kial Kristo devis morti?*

La justeco kaj vereco de Dio postulas kompenson por niaj pekoj, kaj nur la morto de la Filo de Dio povis tion doni.



## Demando 41

*Kial Li estis entombigita?*

Per tio Li atestis, ke Li vere mortinta estis.

## Demando 42

*Kial ni devas morti, se Kristo ja mortis por ni?*

Per nia morto ni ne kompensas por niaj pekoj, sed ni mortas al peko kaj eniras en eternan vivon.

## Demando 43

*Kian plian utilon por ni havas la ofero kaj morto de Kristo sur la kruco?*

Per Lia potenco nia malnova homo estas krucumita, mortinta kaj entombigita, por ke la malbonaj deziroj de nia karno ne plu regu en ni, sed ke ni mem pro dankemeco oferu al Li nian vivon.

## Demando 44

*Kial sekvas: „malsupreniris en la inferon"?*

Meze de la plej malfacilaj tentoj restas al mi unu afero certa: Mia Sinjoro Kristo suferis por mi en Sia vivo kaj ja ankoraŭ pli sur la kruco neesprimeblan doloregon, turmenton kaj torturon kaj per tio Li estas elaĉetinta min el ĉia timego pri la infero.

## Demando 45

*Kian utilon por ni havas la relevo de Kristo?*

Per Sia relevo Kristo venkis la morton kaj per tio donas al ni partoprenon en la justeco, kiun per Sia

morto Li akiris por ni. Kristo jam nun vekas nin per Sia potenco al nova vivo; kaj Kristo kiel pruvita atestanto garantias al ni nian propran feliĉegan relevon.

### Demando 46

*Kion signifas: „supreniris en la ĉielon"?*

Kristo malaperis de antaŭ la okuloj de Siaj disĉiploj kaj estis prenita supren en la ĉielon, por ke Li tie propetu por ni, ĝis Li revenos por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn.

### Demando 47

*Ĉu Kristo ne estas kun ni ĝis la fino de la mondo, kiel Li promesis al ni?*

Kristo estas homo kaj Dio: kiel homo Li nun ne plu restas sur la tero, sed kiel Dio kaj Sinjoro Li neniam forestas de ni kun Sia graco kaj Sia Spirito.

### Demando 48

*Ĉu ne estas, ke per tio la du naturoj en Kristo estas apartigitaj unu for de la alia – se la homa ne estas ĉie, kie estas la Dia?*

Ne; pro tio, ke la Dia naturo estas nekomprenebla kaj tute ĉiea, ĝi estas samtempe ekster la surprenita de ĝi homa naturo kaj ankaŭ en ĝi, kaj ĝi restas persone unuigita kun ĝi.

### Demando 49

*Kian utilon por ni havas la ĉieliro de Kristo?*

Kristo kiel nia Advokato reprezentas nin en la ĉielo antaŭ Sia Patro; Kristo garantias al ni, ke Li kiel la



kapo suprenprenos al Si ankaŭ nin kiel Siajn membrojn en la ĉielon; kaj Kristo malsuprensendas sur nin Sian Spiriton kiel garantiaĵon. En la potenco de tiu Spirito ni devas serĉi tion, kio estas supre, nome Kriston je la dekstra mano de Dio, kaj ne surteraĵojn (Kol. 3:1–2).

### Demando 50

*Kial estas aldonite: „sidas dekstre de Dio"?*

Kristo supreniris en la ĉielon, por ke Li, pere de kiu la Patro ĉion regas, elmontru Sian reg-rajton super Sia Kristana Eklezio, kiel ĝia kapo kaj Sinjoro.

### Demando 51

*Kian utilon por ni havas la Sinjoreco de nia kapo Kristo?*

Kristo per Sia Sankta Spirito elverŝas sur nin, Siajn membrojn, la ĉielajn donacojn; per Sia potenco Li protektas kaj save tenas nin kontraŭ ĉiuj malamikoj.

### Demando 52

*Kian konsolon donas al vi la reveno de Kristo por juĝi la vivantojn kaj la mortintojn?*

En ĉia aflikto kaj persekuto mi kun altelevita kapo esperas al la Juĝisto, kiu jam antaŭe akceptis sur Sin la juĝon de Dio kaj forigis de mi ĉian malbenon, kaj Li ĵetos Siajn kaj miajn malamikojn en la eternan kondamnon, sed Li prenos min kune kun ĉiuj elektitoj al Si en la ĉielan ĝojon kaj gloron.

## *Pri Dio la Sankta Spirito*

Demando 53

*Kion vi kredas pri la Sankta Spirito?*

La Sankta Spirito estas vere tiel same eterna Dio kune kun la Patro kaj la Filo. La Sankta Spirito estas donita ankaŭ al mi kaj sekve de vera kredo donas al mi partoprenon en Kristo kaj en ĉiuj Liaj bonfaroj, konsolas min kaj restas kun mi ĝis la eterneco.

Demando 54

*Kion vi kredas pri la sankta universala Kristana Eklezio?*

La Filo de Dio estas elektinta el la tuta homaro kunularon al eterna vivo. Li kolektas, protektas kaj save tenas ĝin per Sia Spirito kaj per Sia Vorto en la unueco de la vera kredo jam de la kreo de la mondo kaj ĝis ĝia fino. Mi kredas, ke ankaŭ mi kiel vivanta membro apartenas al Lia kunularo nun kaj eterne.

Demando 55

*Kion signifas por vi „la interkunuleco de la sanktuloj"?*

La tuta Eklezio kaj ĉiu unuopa kredanto havas kiel membroj komunan partoprenon en Kristo kaj en ĉiuj Liaj trezoroj kaj donacoj. Ĉiu devas volonte kaj kun ĝojo disponigi siajn donacojn serve al la aliaj membroj, por sanktigi kai helpi ilin. Tion ni ŝuldas al ili.

Demando 56

*Kion vi kredas pri la pardono de la pekoj?*

Pro tio, ke Kristo faris por mi kompenson, Dio volas ne



plu kalkuli al mi miajn pekojn nek mian koruptitecon, kontraŭ kiu mi devas batali dum mia tuta vivo; sed Li volas laŭ Sia graco donaci al mi la justecon de Kristo, por ke mi ne falu sub Lia juĝo.

Demando 57

*Kian konsolon donas al vi la relevo de la karno?*

Je mia morto estos tuj levita al Kristo, ĝia kapo, ne nur mia animo, sed ankaŭ mia karno, vekita de la potenco de Kristo, estos denove unuigita kun mia animo kaj formita laŭ la glora korpo de Kristo.

Demando 58

*Kian konsolon donas al vi la promeso pri eterna vivo?*

Kiel mi jam nun sentas en mia koro la komencon de la eterna ĝojo, post ĉi tiu vivo mi posedos perfektan feliĉegon tian, kian neniu okulo vidis, neniu orelo aŭdis kaj en neniun homan koron venis; kaj en tiu feliĉego mi eterne laŭdos Dion.

Demando 59

*Kian helpon vi ricevas, se vi kredas ĉion tion?*

Per tiu kredo mi estas en Kristo justa antaŭ Dio kaj heredanto de la eterna vivo.

Demando 60

*Kiel vi estas justa antaŭ Dio?*

Nur per la vera kredo je Jesuo Kristo. Kvankam mia konscienco akuzas min, ke mi tre pekis kontraŭ ĉiuj ordonoj de Dio kaj neniun el ili iam obeadis, kaj kvan-

kam mi ĉiam inklinas al ĉia malbono, tamen Dio sen ia merito miaflanke, sed sole laŭ Sia graco donacas al mi la perfektan kompenson, justecon kaj sanktecon de Kristo kaj kalkulas ilin al mi, kvazaŭ mi neniam faris pekon, sed konstante mem plenumis obeon tiel, kiel Kristo por mi ĝin plenumis. Tial Dio deklaras min justa, kiam mi kun kredanta koro akceptas Lian bonfaron.

Demando 61

*Kial vi diras: mi estas justa sole per la kredo?*

Mi plaĉas al Dio ne pro la merito de mia kredo, sed nur pro tio, ke la kompenso, justeco kaj sankteco de Kristo estas mia justeco antaŭ Dio. Tiun justecon mi povas akcepti kaj alproprigi al mi nur per la kredo.

Demando 62

*Kial niaj bonaj faroj ne povas fari nin tute aŭ almenaŭ parte justaj antaŭ Dio?*

Por sukcesi antaŭ la tribunalo de Dio, ni devas esti tute perfektaj kaj ni devas plendetale observi la Leĝon de Dio; sed eĉ niaj plej bonaj faroj en ĉi tiu vivo estas ĉiuj neperfektaj kaj makulitaj de pekoj.

Demando 63

*Ĉu ja estas, ke ni akiras nenian meriton per niaj bonaj faroj, kvankam Dio promesas rekompenci ilin en ĉi tiu kaj en la venonta vivo?*

Dio rekompencas nin ne pro tio, ke ni meritas ĝin, sed pro tio, ke Li grace kompatas nin.



Demando 64

*Ĉu tiu instruo ne igas la homojn senzorgaj kaj aŭdacaj?*

Ne; tiu, kiu estas ligita al Kristo per vera kredo, pro dankemeco produktas bonajn fruktojn kiel bona arbo.

## *Pri la sanktaj Sakramentoj*

Demando 65

*De kie venas la kredo, kiu sola donas al ni partoprenon en Kristo kaj en ĉiuj Liaj bonfaroj?*

La Sankta Spirito efektivigas ĝin en niaj koroj per la predikado de la sankta Evangelio kaj konfirmas ĝin per la uzado de la sakramentoj.

Demando 66

*Kio estas sakramentoj?*

Ili estas videblaj, sanktaj signoj kaj sigeloj, kiujn Dio starigis por per ili deklari kun speciala klareco, kaj atesti, la promeson de la Evangelio: pro la ofero de Kristo sur la kruco Dio pardonas al ni niajn pekojn kaj pro Sia graco donacas al ni la eternan vivon.

Demando 67

*Ĉu la intenco estas, ke Vorto kaj sakramento direktu nian kredon al la ofero de Jesuo Kristo sur la kruco kiel la unusola bazo de nia savo?*

Jes; la Sankta Spirito instruas per la Evangelio kaj konfirmas per la sanktaj sakramentoj, ke nia tuta savo bazas sin sur la ofero de Kristo sur la kruco.

### Demando 68

*En la Nova Testamento kiom da sakramentoj Kristo starigis?*

Du; la sanktan Bapton kaj la sanktan Vespermanĝon

## *Pri la sankta Bapto*

### Demando 69

*Kiel vi estas en la sankta Bapto memorigita kaj certigita, ke la ofero de Kristo sur la kruco profitas ankaŭ al vi?*

Tiel certe, kiel la akvo purigas mian korpon de ĝia malpureco, tiel certe mi estas per la sango kaj Spirito de Kristo purigita de ĉiuj miaj pekoj.

### Demando 70

*Kion signifas: esti purigita per la sango kaj Spirito de Kristo?*

Ni ricevas de Dio per graco pardonon de niaj pekoj pro la sango de Kristo, kiun Li sur la kruco elverŝis por ni. Kaj ni estas per la Sankta Spirito renovigitaj kaj sanktigitaj kiel membroj de Kristo, por ke ni pli kaj pli mortu al la peko kaj vivu pian kaj nepunindan vivon.

### Demando 71

*Kie Kristo promesis al ni, ke ni ĝuste tiel certe lavitaj estas per Lia sango kaj Spirito, kiel per la akvo de la Bapto?*



En la starigo de la Bapto. Jen la vortoj: Iru kaj disĉipligu ĉiujn naciojn, baptante ilin en la nomon de la Patro kaj de la Filo kaj de la Sankta Spirito (Mateo 28:19). Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita; sed kiu ne kredos, tiu estos kondamnita (Marko 16:16). Ĉi tiu promeso estas ripetita, kiam la Skribo nomas la Bapton la lavado de la renasko (Tito 3:5) kaj forlavo de pekoj (Agoj 22:16).

### Demando 72

*Ĉu la akvo forlavas niajn pekojn?*

Ne; nur la sango de Jesuo Kristo kaj la Sankta Spirito purigas nin de ĉiuj pekoj.

### Demando 73

*Kial la Sankta Spirito nomas la Bapton la lavado de la renasko kaj la purigo de la pekoj?*

Dio ne tiel parolas sen bona kaŭzo. En la Bapto Dio donas al ni ne nur parabolon: kiel la malpureco de la korpo estas forprenita de la akvo, tiel niaj pekoj estas forprenitaj de la sango kaj Spirito de Kristo; sed ankaŭ, per tiu Dia garantiaĵo kaj signo Li certigas al ni multe pli: ĝuste kiel la akvo ekstere kaj videble estas lavinta nin, tiel ankaŭ vere kaj efektive, kvankam nevideble, niaj pekoj estas forlavitaj.

### Demando 74

*Ĉu oni baptu ankaŭ malgrandajn infanojn?*

Jes; egalrajte kun plenkreskuloj ili apartenas al la interligo de Dio kaj al Lia kunularo. Validas ankaŭ por ili

la elaĉeto el la pekoj per la sango de Kristo, kaj la Sankta Spirito, kiu instigas al kredo, estas promesita al ili ne malpli ol al plenkreskuloj. Tial ankaŭ ilin oni enkorpigu per la Bapto, la signo de la interligo, en la Kristanan Eklezion kaj distingu ilin de la infanoj de la nekredantoj; ĉar en la Nova Testamento la Bapto estas starigita anstataŭe al la circumcido, la signo de la malnova interligo.

## *Pri la sankta Vespermanĝo de Jesuo Kristo*

### Demando 75

*Kiel vi estas en la sankta Vespermanĝo memorigata kaj certigata, ke ankaŭ vi havas partoprenon en la ofero de Kristo kaj en ĉiuj Liaj propraĵoj?*

Kristo estas ordoninta al mi kaj al ĉiuj kredantoj, ke por memorigo pri Li ni manĝu el ĉi tiu rompita pano kaj trinku el ĉi tiu kaliko, kaj tiurilate Li donis la promeson: kiel certe estas, ke per miaj okuloj mi vidas, ke la pano de la Sinjoro estas rompata por mi, kaj ke Lia kaliko estas proponata al mi, tiel certe estas, ke Lia korpo estis oferita kaj rompita sur la kruco por mi, kaj ke Lia sango estis por mi elverŝita; kaj kiel certe estas, ke mi el la mano de la servisto ricevas kaj korpe ĝuas la panon kaj la kalikon de la Sinjoro, kiuj estas la certaj signoj de la korpo kaj sango de Kristo, tiel certe estas, ke Li mem per Sia krucumita korpo kaj elverŝita sango nutras kaj trinkigas mian animon por la eterna vivo.



### Demando 76

*Kion signifas: manĝi la krucumitan korpon de Kristo kaj trinki Lian elverŝitan sangon?*

Ni devas kun kredanta koro ne nur akcepti la tutan suferadon kaj morton de Kristo kaj ricevi per tio pardonon de pekoj kaj eternan vivon, sed ankaŭ per la Sankta Spirito, kiu samtempe loĝas en Kristo kaj en ni, ni devas fariĝi pli kaj pli unuigitaj kun Lia sankta korpo. Tiamaniere, kvankam Li loĝas en la ĉielo kaj ni estas sur la tero, ni fariĝas karno el Lia karno kaj osto el Lia osto, kaj kiel membroj de unu korpo per Lia Spirito ni vivos, kaj estos devigataj, eterne.

### Demando 77

*Kie Kristo promesis, ke Li ĝuste tiel certe nutras la kredantojn per Sia korpo kaj trinkigas al ili Sian sangon, kiel ili manĝas el ĉi tiu rompita pano kaj trinkas el ĉi tiu kaliko?*

Je la starigo de la Vespermanĝo. Ni legas: La Sinjoro Jesuo en la nokto, en kiu Li estis perfidata, prenis panon, kaj doninte dankon, Li dispecigis ĝin kaj diris: Prenu, manĝu, ĉi tio estas mia korpo, kiu estas rompita por vi; ĉi tion faru por memorigo pri mi! Tiel same ankaŭ la kalikon post la verspermanĝo, dirante: Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango; ĉi tion faru ĉiufoje, kiam vi trinkos, por memorigo pri mi! Ĉar ĉiufoje kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro, ĝis Li venos (1 Kor. 11 : 23—26).
La apostolo Paŭlo ripetas ĉi tiun promeson, kiam li diras: Ĉu ne estas la kaliko de beno, kiun ni benas, partopreno de la sango de Kristo? Ĉu ne estas la pano,

kiun ni dispecigas, partopreno de la korpo de Kristo? Pro tio, ke ni, kiuj estas multaj, estas unu pano, unu korpo; ĉar ni ĉiuj prenas parton el la unu pano (1 Kor. 10 : 16—17).

## Demando 78

*Ĉu la pano kaj vino fariĝas la korpo kaj sango de Kristo?*

Ne; same kiel ĉe la Bapto la akvo ne estas ŝanĝita en la sangon de Kristo kaj per si mem forlavas la pekojn, sed estas Dia signo kaj garantiaĵo, tiel same ĉe la Vespermanĝo la sankta pano ne estas ŝanĝita en la korpon de Kristo, malgraŭ tio, ke ĝi estas nomata la korpo de Kristo.

## Demando 79

*Kial Kristo nomas la panon Sia korpo kaj la kalikon Sia sango aŭ la nova interligo en Sia sango, kaj kial Paŭlo nomas la panon kaj kalikon la partopreno de la korpo kaj sango de Jesuo Kristo?*

Kristo ne tiel parolas sen bona kaŭzo. Per la Vespermanĝo Li donas al ni ne nur parabolon: kiel pano kaj vino subtenas la tempan vivon, tiel Lia krucumita korpo kaj elverŝita sango nutras kaj trinkigas niajn animojn por la eterna vivo. Sed ankaŭ per ĉi tiu signo kaj garantiaĵo Li certigas al ni multe pli: tiel vere kaj efektive, kiel ni ricevas per nia korpa buŝo ĉi tiujn sanktajn signojn por memorigo pri Li, tiel per la Sankta Spirito ni ricevas partoprenon en Lia vera korpo kaj sango. Per tio Kristo donas al ni la certecon, ke Lia suferado kaj Lia obeado estas kalkulitaj al ni, kvazaŭ ni mem en nia propra memo estus ĉion suferintaj kaj plenumintaj.



## Demando 80

*Kia diferenco ekzistas inter la Vespermanĝo de la Sinjoro kaj la Romkatolika Meso?*

La Vespermanĝo atestas al ni, ke ni havas kompletan pardonon por ĉiuj niaj pekoj per la ofero de Jesuo Kristo, kiun Li mem unufoje por ĉiam faris sur la kruco; kaj ke ni estas per la Sankta Spirito unuigitaj kun Kristo, kiu nun en Sia vera korpo reĝas je la dekstra mano de la Patro en la ĉielo, kaj volas esti tie adorata. Sed la Meso instruas, ke la vivantoj kaj la mortintoj ricevas pardonon por siaj pekoj per la suferado de Kristo, nur kiam Kristo estas ĉiutage denove oferita por ili de la Mes-sacerdotoj; kaj ke Kristo estas korpe en la pano kaj vino — oni do devas adori Lin tie. Per tio la Meso neas la unufojan kaj solan oferon kaj suferadon de Jesuo Kristo kaj estas malbeninda idolkulto.

## Demando 81

*Kiu devus veni al la tablo de la Sinjoro?*

Ĉiu, kiu sentas malplaĉon pri si pro siaj pekoj kaj tamen fidas, ke Dio pardonas ilin al li kaj ke la suferado kaj morto de Kristo kovras ankaŭ lian restantan malfortecon; ankaŭ ĉiu, kiu sopiras al pli forta kredo kaj pli pura vivo. Male, nepentantoj kaj hipokrituloj manĝas kaj trinkas juĝon al si mem.

## Demando 82

*Ĉu ankaŭ tiuj, kiuj montras sin laŭ konfeso kaj vivo nekredantaj kaj sendiaj, rajtas esti allasitaj al la Vespermanĝo?*

Ne; alie la interligo de Dio estas malŝatata kaj la kolero de Dio provokata kontraŭ la tuta kunularo. Tial la Kristana Eklezio laŭ la ordono de Kristo kaj Liaj apostoloj, tenante la oficon de la ŝlosiloj, devas eksterenŝlosi ilin ĝis ili pentofaros.

### Demando 83

*Kio estas la ofico de la ŝlosiloj?*

La predikado de la sankta Evangelio kaj la disciplino de la Eklezio, ĉar per ambaŭ estas la regno de la ĉielo malŝlosita al la kredantoj, sed ŝlosita al la nekredantoj.

### Demando 84

*Kiel estas la regno de la ĉielo malŝlosita kaj ŝlosita per la predikado de la sankta Evangelio?*

Laŭ la ordono de Kristo estas proklamite kaj publike atestite, ke Dio pro la merito de Kristo pardonas ĉiujn pekojn de la tuta kristana kunularo kaj de ĉiu sola kredanto tiel ofte, kiel ili akceptas la promeson de la Evangelio kun vera kredo; sed Dio minacas je kolero kaj eterna kondamno ĉiujn nekredantojn kaj hipokritulojn tiel longe, kiel ili restas nekonvertitaj. Laŭ ĉi tiu juĝo, kiun Dio jam nun eldiras rilate la kredantojn kaj nekredantojn, Li iam je la lasta tago juĝos; tion atestas la Sankta Skribo.

### Demando 85

*Kiel la disciplino de la Eklezio ŝlosas kaj malŝlosas la regnon de la ĉielo?*

Kristo ordonas: Tiu, kiu – malgraŭ ke li portas la nomon Kristano – tamen nekristane instruas kaj vivas,



estas admonita. Tiu, kiu malgraŭ ripetita frateca admonado ne forlasas siajn erarojn kaj malvirtojn, estas denuncita al la eklezio aŭ al tiuj, kiuj estas por tio delegitaj. Tiu, kiu malgraŭ ilia averto ne ŝanĝas sian vivmanieron, estos eksterenŝlosita de ili for de la ĝuo de la sanktaj sakramentoj. Per tio li estos elĵetita el la kristana kunularo, ja el la regno de Kristo fare de Dio mem. Tamen tiu, kiu promesas kaj montras veran plibonigon, devas denove esti akceptita kiel membro de Kristo kaj kiel membro de la eklezio.

# LA TRIA PARTO

## *Pri Dankemeco*

### Demando 86

*Se ni estas elaĉetitaj de Kristo el nia mizero sen ia merito niaparte, sed sole per graco, kial ni devas fari bonajn farojn?*

Post kiam Kristo estas aĉetinta nin per Sia sango, Li per Sia Sankta Spirito ankaŭ renovigas nin al Sia bildo, por ke dum nia tuta vivo ni danku Dion pro Lia bonfarado; ke Li estu laŭdata de ni; ke ni fariĝu certaj pri nia kredo, vidante ĝiajn fruktojn; kaj ke per nia pia vivmaniero ni gajnu niajn kunhomojn por Kristo.

### Demando 87

*Ĉu povas esti savitaj tiuj, kiuj ne turnas sin al Dio for de sia sendanka kaj pentomanka vivo?*

Ne; laŭ la Sankta Skribo neniu malĉastulo, idolano, adultulo, ŝtelanto, avarulo, ebriulo, insultanto, rabemulo aŭ aliaj pekuloj heredas la regnon de Dio.

### Demando 88

*El kio konsistas la vera pentofaro kaj konvertiĝo de la homo?*

El formorto al la malnova kaj el la relevo de la nova homo.

### Demando 89

*Kion signifas la formorto al la malnova homo?*

Ke ni elkore bedaŭras niajn pekojn kaj pli kaj pli malamas kaj evitas ilin.



### Demando 90

*Kion signifas la relevo de la nova homo?*

Ke ni elkore ĝoju en Dio pere de Kristo kaj kun arda deziro ordigu nian vivon laŭ la volo de Dio, por ke ni ekzercu nin en ĉiuj bonaj faroj.

### Demando 91

*Kiuj faroj estas bonaj?*

Bonaj estas nur tiuj faroj, kies fonto estas la kredo, kiuj akordas kun la Leĝo de Dio kaj kiuj honoras Dion; sed aliflanke, ne tiuj, kiujn oni mem arbitre elektas, nek tiujn, kiujn homaj tradicioj ordonas.

### Demando 92

*Kio estas la Leĝo de Dio?*

Dio parolis ĉiujn ĉi tiujn vortojn:
1-a ordono: Mi estas la Eternulo, via Dio, kiu elkondukis vin el la lando Egipta, el la domo de sklaveco. Ne ekzistu ĉe vi aliaj dioj antaŭ Mi.

2-a ordono: Ne faru al vi idolon, nek bildon de io, kio estas en la ĉielo supre aŭ sur la tero malsupre aŭ en la akvo sub la tero; ne kliniĝu antaŭ ili kaj ne servu ilin, ĉar Mi, la Eternulo, via Dio, estas Dio severa, kiu la malbonagojn de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj ĉe Miaj malamantoj, kaj kiu faras favorkoraĵon por miloj al Miaj amantoj kaj al la plenumantoj de Miaj ordonoj.
3-a ordono: Ne malbonuzu la nomon de la Eternulo, via Dio, ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon.

4-a ordono: Memoru pri la tago sabata, ke vi tenu ĝin sankta. Dum ses tagoj laboru kaj faru ĉiujn viajn aferojn; sed la sepa tago estas sabato de la Eternulo, via Dio; faru nenian laboron, nek vi, nek via filo, nek via filino, nek via sklavo, nek via sklavino, nek via bruto, nek via fremdulo, kiu estas inter viaj pordegoj; ĉar dum ses tagoj la Eternulo kreis la ĉielon kaj la teron, la maron, kaj ĉion, kio estas en ili, sed en la sepa tago Li ripozis. Tial la Eternulo benis la tagon sabatan kaj sanktigis ĝin.
5-a ordono: Respektu vian patron kaj vian patrinon, por ke longe daŭru via vivo sur la tero, kiun la Eternulo, via Dio, donas al vi.
6-a ordono: Ne mortigu.
7-a ordono: Ne adultu.
8-a ordono: Ne ŝtelu.
9-a ordono: Ne parolu kontraŭ via proksimulo malveran ateston.
10-a ordono: Ne deziru la domon de via proksimulo; ne deziru la edzinon de via proksimulo, nek lian sklavon, nek lian sklavinon, nek lian bovon, nek lian azenon, nek ion, kio apartenas al via proksimulo (Eliro 20 : 1—17; Readmono 5 : 6—21).

## Demando 93

*Kiel oni dividas tiujn ordonojn?*

En du tabelojn. La unua tabelo instruas en kvar ordonoj, kiamaniere ni devas konduti rilate al Dio, la alia en ses ordonoj instruas tion, kion ni ŝuldas al nia proksimulo.



## Demando 94

*Kion postulas Dio en la unua ordono?*

Pro la sano kaj savo de mia animo mi devas kontraŭstari kaj eviti ĉian idoladoron, sorĉadon, aŭguradon, superstiĉon, alvokon al la sanktuloj aŭ al aliaj kreitaĵoj; male, mi devas prave koni la unu veran Dion, fidi sole al Li, submeti min al Li en tuta humileco kaj pacienco, kaj atendi sole de Li ĉian bonon. Mi devas ami, timi kaj glori Lin per mia tuta koro tiamaniere, ke mi prefere liberigus min de ĉiuj kreitaĵoj, ol ke mi farus eĉ la plej malgrandan aferon kontraŭ Lia volo.

## Demando 95

*Kio estas idoladoro?*

Ni praktikas idoladoron, kiam anstataŭe aŭ aldone al la unu vera Dio, kiu estas Sin revelaciinta en Sia Vorto, ni fidas al io ajn, kion ni mem imagas kaj elektas.

## Demando 96

*Kion postulas Dio en la dua ordono?*

Ni devas ne prezenti Dion per ia ajn figuraĵo, nek adori Lin en ia maniero alia ol tiu, kiun Li estas ordoninta al ni en Sia Vorto.

## Demando 97

*Ĉu estas malpermesite fari ian figuraĵon?*

Ne estas eble aŭ permesite iamaniere figuri Dion, kaj Dio malpermesas, ke ni faru aŭ posedu figuraĵon de ia kreitaĵo, por ke ni adoru ĝin aŭ adoru Dion per ĝi.

## Demando 98

*Ĉu oni povas toleri figuraĵojn kiel medit-helpilojn por la homoj en la preĝejoj?*

Ne; ni devas ne opinii, ke ni estas pli saĝaj ol Dio, kiu volas, ke Lia Kristanaro estu instruata ne per mutaj idoloj, sed per la vivanta predikado de Lia Vorto.

## Demando 99

*Kion postulas la tria ordono?*

Ni devas atenti, ke ni ne profanu aŭ misuzu la nomon de Dio, uzante ĝin en malbenoj aŭ falsaj ĵuroj aŭ nenecese por ĵurado. Ni devas ne fari nin kunkulpaj rilate tiajn terurajn pekojn, aŭskultante ilin sen protesto. Precipe ni devas ne uzi la sanktan nomon de Dio sen timo kaj respektego, por ke Li estu de ni prave konfesata, alvokata kaj per ĉiuj niaj vortoj kaj faroj laŭdata.

## Demando 100

*Ĉu la profanado de la nomo de Dio per la malprava uzado de ĝi en ĵurado kaj malbenoj estas peko tiel grava, ke Dio koleras eĉ kontraŭ tiuj, kiuj preterlasas la okazon malhelpi kaj malpermesi ĝin kiel eble plej forte?*

Jes; estas neniu peko, kiu estas pli grava kaj pri kiu Dio pli forte koleriĝas, ol la profanado de Lia nomo. Tial Dio estas ordoninta, ke la puno por ĝi estu la morto.



## Demando 101

*Ĉu estas iam permesite ĵuri per la nomo de Dio, ne rompinte la trian ordonon?*

Jes; se la aŭtoritatuloj postulas ĝin flanke de siaj subuloj, aŭ se cirkonstancoj nepre postulas ĝin, por ke fideleco kaj vereco estu per ĝi fortigitaj, tiam ni ĵuru por la gloro de Dio kaj la bonfarto de niaj proksimuloj. En tiaj okazoj ĝi estas pravigata de la vorto de Dio, kaj la sanktuloj de la malnova kaj de la nova interligo konsentas pri tio.

## Demando 102

*Ĉu estas permesite ĵuri per la sanktuloj aŭ per aliaj kreitaĵoj?*

Ne; ĉiu prava ĵuro alvokas Dion, por ke Li, kiu sola la korojn elserĉas, atestu pri ĝia vereco kaj ke Li punu min, se mi estus malvere ĵurinta. Tiu honoro ne rajte apartenas al iu ajn kreitaĵo.

## Demando 103

*Kion Dio postulas en la kvara ordono?*

Laŭ la volo de Dio oni devas daŭre konservi la predikadon de Lia Vorto en preĝejoj kaj lernejoj, kaj mi devas precipe je festotagoj diligente ĉeesti la Diservon de la kunularo, por aŭskulti la Vorton de Dio, ricevi la sanktajn sakramentojn, preĝi publike al la Eternulo kaj doni almozojn laŭ mia ebleco. Kaj laŭ la volo de Dio mi devas ĉiun tagon forlasi miajn malbonajn farojn, lasi la Eternulon per Sia Spirito energii en mi kaj tiamaniere komenci en ĉi tiu vivo la eternan Sabaton.

## Demando 104

*Kion Dio postulas en la kvina ordono?*

Mi devas montri al mia patro kaj al mia patrino kaj al ĉiuj miaj superuloj justan honoron, amon kaj fidelecon, submeti min obeeme al ĉiu bona instruo kaj puno kaj pacience toleri iliajn erarojn kaj mankojn; ĉar Dio volas nin regi pere de ili.

## Demando 105

*Kion Dio postulas en la sesa ordono?*

Estas malpermesite, ke mi mem aŭ ke mi per iu alia per pensoj, vortoj, gestoj aŭ ja per faroj mallaŭdu, malamu, insultu aŭ mortigu mian proksimulon; sed mi devas forigi el mi ĉian venĝemecon; mi devas ne malutili aŭ bravaĉe endanĝerigi min. Dio permesis al la aŭtoritatuloj, ke ili portu la glavon, por ke ili malhelpu mortigojn.

## Demando 106

*Ĉu la ordono parolas nur pri mortigado?*

Per la malpermeso pri mortigado Dio instruas al ni, ke Li malamas envion, malamon, koleron kaj venĝemon kiel radikojn de mortigado kaj ke Li rigardas ilin kiel egalajn al mortigado.

## Demando 107

*Ĉu ni plene plenumas la ordonon, se ni ne mortigas nian proksimulon?*

Ne; per tio, ke Dio kondamnas envion, malamon kaj koleron, Li samtempe ordonas al ni, ke ni amu nian



proksimulon kiel nin mem, montru al li paciencon, pacon, bonkorecon, kompaton kaj amikecon kaj ĝis la limo de nia povo forpelu for de li ĉian malutilon kaj eĉ faru bonon al niaj malamikoj.

## Demando 108

*Kion postulas la sepa ordono?*

Dio malbenas ĉian malĉastecon; tial ni devas tutkore abomeni ĝin kaj vivi pure kaj ĉaste, ĉu en la geedza aŭ en la fraŭla stato.

## Demando 109

*Ĉu en tiu ordono Dio malpermesas nur la adulton kaj similajn hontindaĵojn?*

Dio ordonas, ke ni tenu korpon kaj animon kiel templojn de la Sankta Spirito puraj kaj sanktaj. Tial Li malpermesas ĉiujn malĉastajn farojn, gestojn, vortojn, pensojn, voluptojn kaj ĉion, kio povas allogi homojn al tiaj aferoj.

## Demando 110

*Kion Dio malpermesas en la oka ordono?*

Dio malpermesas ne nur la krimojn de ŝtelado kaj rabado, kiujn la aŭtoritatuloj punas, sed Dio nomas ŝtelado ankaŭ ĉiujn malbonajn artifikojn kaj ruzaĵojn, per kiuj ni provas akiri por ni mem la havaĵojn kaj posedaĵojn de nia proksimulo per perforto aŭ per ia ŝajno de justeco; tio povas esti afero pri nejusta pezilo, ulno, mezurilo, varo, monero kaj pri uzuro aŭ ia ajn alia rimedo, kiun Dio estas malpermesinta, inkluzive de avareco kaj facilanima malŝparado.

Demando 111

*Kion postulas Dio en ĉi tiu ordono?*

Ĝis la limo de mia povo mi devas servi al la interesoj de mia proksimulo; agi tiamaniere al li, kiel mi deziras, ke aliaj agu al mi; kaj labori kun fervoro, por ke mi povu helpi al la senhavulo en lia bezono.

Demando 112

*Kion postulas la naŭa ordono?*

Mi devas ne atesti malvere pri iu ajn, ne ruze misciti ies vortojn, ne kalumnii nek mallaŭdi, ne helpi kondamni iun facilanime kaj ne aŭskultinte lian defendon; sed mi devas sub minaco de la kolero de Dio eviti ĉiun specon de mensogado kaj trompado kiel aferoj de la diablo; mi devas ami la veron antaŭ tribunalo kaj en ĉia okupo; mi devas honeste paroli kaj konfesi kaj ĝis la limo de mia povo mi devas defendi kaj plialtigi la reputacion kaj honoron de mia proksimulo.

Demando 113

*Kion postulas la deka ordono?*

Ni devas ne lasi leviĝi en ni, eĉ en plej malgranda grado, dezirojn aŭ pensojn kontraŭajn al iu ajn ordono de Dio; sed ni devas konstante kaj per nia tuta koro malami ĉian pekon, kaj plenumi kun ĝojo ĉiun postulon de Dio.

Demando 114

*Ĉu tiuj, kiuj konvertiĝis al Dio, povas perfekte obei ĉi tiujn ordonojn?*

Ne; eĉ la plej sanktaj homoj sukcesas fari en sia vivo nur mizeran komencon; tamen ili senlace, kun seriozeco



kaj fervoro provas direkti sian vivon ne nur laŭ kelkaj, sed laŭ ĉiuj ordonoj de Dio.

Demando 115

*Kial Dio volas, ke la dek ordonoj estu enplantitaj en ni per predikado, se neniu homo en ĉi tiu vivo povas plenumi ilin?*

Dum nia tuta vivo ni devas ĉiam pli klare konscii pri nia pekema naturo kaj tial des pli fervore serĉi ĉe Kristo pardonon de pekoj kaj justecon. Kaj ni devas peti Dion, kaj sen intermitoj klopodu, por la graco de la Sankta Spirito, por ke ni estu pli kaj pli renovigataj laŭ la bildo de Dio, ĝis ni atingos post ĉi tiu vivo la celon de perfekteco.

## *Pri Preĝado*

Demando 116

*Kial devas Kristano preĝi?*

Preĝado estas la plej supera parto de dankemeco, kiun Dio postulas de ni, kaj Dio volas doni Sian gracon kaj la Sanktan Spiriton nur al tiuj, kiuj elkore kaj konstante petas Lin por ili kaj dankas Lin pro ili.

Demando 117

*Kio apartenas al iu preĝo, ke ĝi plaĉu al Dio, kaj ke Li favore aŭskultu ĝin?*

Ni devas elkore alvoki nur la veran Dion, kiu en Sia Vorto revelaciis Sin al ni, por ĉio, por kio Li estas or-

doninta, ke ni petu. Ni devas ĝisfunde konscii pri nia spirita malriĉeco kaj nia mizero, humiligi nin antaŭ la gloro de Dio kaj firme fidi, ke Dio malgraŭ nia neindeco pro Kristo, nia Sinjoro, certe favore aŭskultos nian preĝon, kiel Li promesis al ni en Sia Vorto.

Demando 118

*Por kio Dio ordonis, ke ni petu al Li?*

Por ĉio, kion ni bezonas por korpo kaj animo, kiel Jesuo Kristo nia Sinjoro estas ampleksinta ĉion en Sia preĝo.

Demando 119

*Kiel tekstas la Preĝo de la Sinjoro?*

Patro nia, kiu estas en la ĉielo, sanktigata estu Via nomo, venu Via regno, fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero. Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ, kaj pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj. Kaj ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono. Ĉar Via estas la regno kaj la potenco kaj la gloro, eterne. Amen.

Demando 120

*Kial Kristo ordonis al ni alparoli Dion jene: Nia Patro?*

Per tio Li volas jam de la komenco de nia preĝo veki en ni la infanan respektegon kaj fideman esperon al Dio, kiuj devas esti la bazo de nia preĝo. Per Kristo Dio estas fariĝinta nia Patro kaj tial Li multe malpli volas rifuzi al ni tion, kion ni kun fido petas de Li, ol niaj patroj rifuzas al ni terajn aferojn.



Demando 121

*Kial Li aldonas: Kiu estas en la ĉielo?*

Ni devas ne malalte pensi pri la ĉiela majesteco de Dio, sed ni devas atendi de Lia ĉiopoveco ĉion, kion ni bezonas por korpo kaj animo.

Demando 122

*Kion celas la unua peto?*

Sanktigata estu Via nomo; tio signifas: Donu, ke ni prave konu Vin, kaj ĉe ĉiuj Viaj faroj honoru, laŭdu kaj gloru Vian ĉiopovecon, saĝon, bonecon, justecon, kompaton kaj verecon. Kaj donu, ke ni dum nia tuta vivo ordigu niajn pensojn, vortojn kaj farojn tiamaniere, ke Via nomo kaŭze de ni ne estu blasfemata, sed estu honorata kaj laŭdata.

Demando 123

*Kion celas la dua peto?*

Venu Via regno; tio signifas: Regu nin per Via Vorto kaj Via Spirito, por ke ni pli kaj pli submetu nin al Via suvereneco. Konservu Vian Eklezion kaj kreskigu ĝin; sed detruu la farojn de la diablo kaj neniigu ĉiun potenculon, kiu konkure sin levas kontraŭ Vi, kune kun ĉiuj atencoj, kiuj estas elpensataj kontraŭ Via sankta Vorto, ĝis Vi estos fine kaj komplete stariginta Vian regnon kaj estos ĉio en ĉio.

Demando 124

*Kion celas la tria peto?*

Fariĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaŭ sur la tero; tio signifas: Donu, ke ni kaj ĉiuj homoj rezignu pri nia

propra volo kaj obeu al Via sankta volo sen ia kontraŭdirado; por ke ni elplenumu nian oficon kaj profesion tiel volonte kaj fidele, kiel faras tion la anĝeloj en la ĉielo.

Demando 125

*Kion celas la kvara peto?*

Nian panon ĉiutagan donu al ni hodiaŭ; tio signifas: Provizu por ni ĉion, kion ni bezonas por nia korpo, kaj ebligu al ni konscii, ke Vi estas la sola fonto de ĉio bona, kaj ke sen Via beno nek niaj zorgoj kaj nia laboro, nek Viaj donacoj servas al nia bonfarto, por ke ni tial metu nian fidon ne sur iun ajn kreitaĵon, sed sole sur Vin.

Demando 126

*Kion celas la kvina peto?*

Pardonu al ni niajn ŝuldojn, kiel ankaŭ ni pardonas al niaj ŝuldantoj; tio signifas: Pro la sango de Kristo ne kalkulu al ni, kompatindaj pekuloj, ĉiujn niajn misfarojn kaj la malbonon, kiu ankoraŭ ĉiam algluiĝas al ni, kiel ankaŭ ni trovas en ni kiel atestaĵon de Via graco la firman intencon elkore pardoni al niaj proksimuloj.

Demando 127

*Kion celas la sesa peto?*

Ne konduku nin en tenton, sed liberigu nin de la malbono; tio signifas: Ĉar pro nia malforteco ni ne povas eĉ unu momenton stari firmaj, kaj ĉar niaj malkaŝaj malamikoj, la diablo, la mondo kaj nia propra karno,



senintermite afliktas nin, tial tenadu kaj fortigu nin per la potenco de Via Sankta Spirito, por ke ni en ĉi tiu spirita batalo ne cedu, sed faru potencan kontraŭstaron, ĝis ni gajnos kompletan venkon.

Demando 128

*Kiel vi finas la preĝon?*

Ĉar Via estas la regno kaj la potenco kaj la gloro, eterne; tio signifas: Ni petas ĉion tion de Vi, ĉar Vi kiel nia Reĝo laŭ la povo de Via ĉiopotenco povas kaj volas doni al ni ĉion bonan, kaj pro tio ĉia gloro venas ne al ni, sed al Via sankta nomo eterne.

Demando 129

*Kion signifas la vorteto: Amen?*

Amen signifas: Tio estu vera kaj certa. Multe pli certe, ol mi mem sentas mian elkoran sopiron, Dio estas favore aŭskultinta mian preĝon.

## *Lingvaj rimarkoj*

Tradukinto kaj eldoninto debatis pri pluraj esprimmanieroj, kiuj plaĉis al l' unu aŭ al l' alia pli bone. Ni metas ilin ĉi tien, por ke la leganto povu pli bone kompreni la tradukitan lokon. Maldekstre staras la elektitaj vortoj, dekstre la ankaŭ proponitaj vortoj. D = signifas demando, R = respondo.

| | | |
|---|---|---|
| 1 R, 34 R | kara altvalora | kara preterpreza |
| 19 R | predikigis | lasis, ke ĝi estas predikata |
| (Leĝo | kun majusklo, ĉar la | vorto aludas al la Torah) |
| 26 R | kunlaborigos | igos kunlabori |
| 31 R | destinita | difinita |
| 33 R | akceptis | adoptis |
| 39 R | per tiu morto | per ĝi |
| 45 R | justeço | justo |
| 61 D | sole | nur |
| 62 R | de pekoj | per pekoj |
| 78 R | ke ĝi estas nomata | estas mencio pri |
| 81 D | Kiu devus veni | Kiu venu aŭ devas veni |
| 93 R | nia proksimulo | niaj proksimuloj |
| 94 R | glori | honori |
| 101 R, 128 R | gloro | honoro |
| 114 R | laŭ kelkaj | laŭ tiu aŭ alia ordono |
| 117 R | por ĉio, por kio Li | por ĉio, kion Li |
| (119 R | estas la oficiala teksto | de KELI) |
| 120 R | fideman esperon al | fideman dependecon de |
| 123 R | neniigu | pereigu aŭ ekstermu |
| 124 R | elplenumu | plendetale plenumu |

La Malgranda Katekismo
de Doktoro Martin Luther
kaj
La Aŭgsburga Konfesio

tradukita de Richard Hoppe
eldonita de Oekumenische Liga e. V.
Prezo: DM 1,10